# NORDA GAZETO

DUMONATA BULTENO
DE LA
NORDFRANCA ESPERANTO-FEDERACIO

Redaktoro kaj responda eldonanto :
Lucien BOURGOIS,
21, Rue Gambetta,
NOYELLES-GODAULT (62).

Kotizoj (kun bultenservo)
a) Junuloj : 2 Fr.
b) Aktiva membreco : 3 Fr.
c) Subtenanto : 5 Fr.

Fédération Espérantiste du Nord de la France,
17, Rue des Bouvreuils, ARRAS (62).

Ĝenerala Sekretario : Fernand DITACROUTE, 178, Chemin Castre, CALAIS (62).

Informilo n-ro 3 Majo-Junio 1965

## LA FILMO "ANGOROJ" PREZENTITA EN LILLE
## OKAZE DE NIA KONGRESO LA 9-an DE MAJO 1965

En la kinejo ĉe la Komerca Foiro, ĉirkaŭ 120 ges-anoj ĉeestis la projekcion de la unua originala filmo en Esperanto "Angoroj" de J.L. Mahé.

Ege sukcesa k. rekorda partopreno! Preskaŭ la duono estis belgaj amikoj (tuta aŭtobuso el Bruĝo k. esperantistaj fervojistoj el Bruselo). Ni rimarkis ankaŭ 4 internaciajn geedzojn.

Recenzon pri la filmo mi ne faros, ĉar vi jam multe legis pri ĝi en la esperantista gazetaro okaze de aliaj prezentadoj.

Sur la scenejo, S-roj VILHELM, Sekretario de Lille-Esperanto, kaj DITACROUTE, ĝenerala Sekretario de la Federacio, salutis la ĉeestantaron per bonvenvortoj. S-ro MAERTENS el Bruĝo, belga reprezentanto por Markola Konfederacio, prezentis al ni la komitaton de junulara grupo (Prezidanto, Sekretario k. kasisto - ne pli ol 15-jaraĝaj!).

Dum la tuta foira daŭro funkciis konstanta Esp-o budo, kiun vizitis multaj kongresanoj, ĉu antaŭ la filmo, ĉu poste, ĝis la momento iri al la bankedejo.

Tie, la ĉeestantoj estis regalataj per honorvino, sekvata de la bankedo, je la 13-a.

Ĉe la deserto S-ro PICAVET, Foira reprezentanto, ĉiam fidela al niaj manifestacioj, emfazis la konstantan progreson de nia Movado. S-ro ODENT, federacia Prezidanto, respondis per dankvortoj; kaj S-ro MAERTENS priparolis la baldaŭan Markolan Kongreson en Ostendo.

Post la plezuroj sekvas la laboro.

Je la 15-a, dum la kandidatoj restis en la bankedejo por ekzameniĝi, la federacianoj estis invitataj ĉeesti en la apuda salono ("C") la Jaran Federacian Kongreson.

La Prezidanto malfermis la kunsidon kaj senkulpigis la jenajn personojn : S-roj PHILIPPE, LESOIN, DUMARQUEZ, BUERICK, BONVOISIN ; F-inoj AMUCHIEN, LECLERCQ ; Ges-roj SKOLE, WEBER k. Filo.

Li tuj poste transdonis la parolvicon al S-ro DITACROUTE, Ĝenerala Sekretario, por legi la agadraporton de la jaro 1964, kaj S-ro DOYELLE, kasisto, por la financa raporto. Ambaŭ raportoj estis unuvoĉe aprobitaj.

S-ro DOYELLE sciigis, ke la kotizoj malkreskas (180 en 1963 ; 160 en 1964 ; 100 ĉijare) ; kaj tiurilate S-ro GILOTEAUX rimarkigis, ke pli da personoj ĉeestas la renkontiĝojn, dum malpli pagas la kotizon. Stranga konstato!

Unuvoĉe, la Federacia Konsilio prezentita de S-ro ODENT estas elektita.

Estis ankaŭ aprobitaj la novaj statutoj de la Federacio, kiu inkluzivas nun 2 pliajn departementojn (Aisne k. Oise).

Tiurilate, S-ro ODENT akcentis la neceson starigi departementajn sekciojn. Tiucele, ni bezonas departementajn sekretariojn. Ni do petas la eventualajn kandidatojn sin turni al la ĝenerala sekretario. Ilia tasko estos facila : ekkoni kaj enlistigi la Esperantistojn en la Departemento kaj laŭeble faciligi, eĉ sugesti, organizi reciprokajn kontaktojn.

La Prezidanto poste transdonis la parolvicon al S-ro GILOTEAUX, kiu priparolis, kiel kutime, la gazetaran servon kaj informis la federacianojn pri la lastaj novaĵoj el la grupoj, pri novaj libroj, ktp. Li fine sciigis, ke U.F.E. plendas pro la fakto, ke ne estas sufiĉe da membroj ĉe Norda Federacio.

Antaŭ la fermo de la kunsido, S-ro ODENT diris kelkajn vortojn pri la interesa iniciato de S-ro JAUMOTTE, kiu starigis aŭto-fakon : "Internacia Esperanto-Klubo Aŭtomobilista". Ni devas esti multnombraj por apogi ĝin.

Li fine invitis ĉiujn partopreni la proksiman renkontiĝon, kiu okazos en AMIENS, la 17-an de Oktobro, por celebri nian novan 5-departementan teritorion.

Ni petas la organizintojn de tiu Lille-a Tago - kaj ankaŭ la aranĝintojn de la foira budo kaj deĵorantojn - akcepti varman dankon.

Fernand DITACROUTE.

## 4-a Markola Kongreso

Estimataj Federacianoj,

La NFEF kore invitas vin honori per ĉeesto la 4-an Markolan Kongreson, kiu okazos en Ostende (Belgujo), la 5 - 6 - 7 Junio 1965.

Kongresejo : Festpalaco de Ostendo "WAPENPLEIN".

Dimanĉa programo : (6-an de Junio)

9 h. Salono Witteryck : Kunveno de la junularo.

10 h. Malfermo de la Esperanto ekspozicio en la halo de la kongresejo (speciale por eksterstarantoj).

10 h. Kunsido de la Markolanoj en Salono Witteryck.

11 h. Komuna kunveno de la Markola Kongreso kaj de B.E.F.
Temo : "La Jaro de Internacia Kunlaborado".

12 h. Akcepto en la urbdomo.

13 h. Fotado de la kongresanoj.

15 h. Vizito de la Urba Muzeo sub gvidado de S-ro ROOSE.

17 h. Mareskurso sur granda ŝipo. Prezo : 3 Fr. (francaj).

18 h. (laŭvole) Diservo.

19 h. Bankedo. Prezo : 15 Fr. (francaj).

21 h. Balo en la festpalaco WAPENPLEIN.

Unuataga (dimanĉa) kotizo : 3 Fr. (francaj)
ĝirantaj al : S-ro Georges ODENT, C.C.P. LILLE 1437- 63.

Grave! Bonvolu mencii la motivon de la monsendo.

PARTOPRENU MULTNOMBRE! ANTAŬDANKON!

La Federacia Estraro.

---

Samdate : 5 - 6 - 7 Junio 1965 :

57-a Nacia Esperanto-Kongreso en LE HAVRE.

Kongresejo : Salonoj François 1-er, Boulevard François 1-er, Porte Océane.

Interesatoj sin turnu al : 57e Congrès National d'Espéranto,
33, rue Saint-Michel, LE HAVRE.

Federacia Renkontiĝo en AMIENS :

ATENTU ! ATENTU ! En la informilo de Marto-Aprilo, ni indikis al vi daton. Ĝi jam ne validas ĉar okazis ŝanĝiĝo.

Bonvolu noti, ke nia fed. renkontiĝo okazos en AMIENS dimanĉon 17-an de oktobro.

NIA VIVO.

CALAIS : La Kultura Centro Esperanto intencas ĝemeliĝi kun esperantista grupo el DUISBURG (Germanio).

MERICOURT : La loka grupo "Frateco per Esperanto", kiu jam ekskursis peraŭtobuse al WALCHEREN aranĝos duan vojaĝon al la sama nederlanda iama insulo de Zelando, ĵaŭde 10-an de Junio.

Interesatoj enskribiĝu al : S-ino Van PARYS, 83, Cité des Cerisiers, MERICOURT/LENS (62).

NASKIĜO : La 9-an de Marto, naskiĝis filineto : SYLVA, en la hejmo de nia ĉeka amiko KOCVARA. Ni gratulas la gepatrojn pro ĉi tiu feliĉa familia evento.

LA GAZETARO KAJ NI :

"La Voix du Nord" : ĵaŭde 13-an de Majo aperis, kun foto de S-ino Iana RAVSELY, artikolo pri la esperantlingva parolfilmo "Angoroj".

Ĝi vekis grandan intereson de la neesperantista legantaro.

"Télé 7 Jours" : En ĝia n-ro 268-a (8-an de majo); ĉi tiu grava semajno-magazino televida aperigis artikoleton de LAVERGNE, titolitan : "Jules VERNE et l'Espéranto". Ĝi sciigas, ke la fama sciencanticipa romanisto ne nur okupis postenon kiel magistratano, sed ke li ankaŭ estis Prezidanto de la Esperantista Grupo en Amiens.

Sciinde, ke Jules VERNE komencis la verkadon de romano, en kiu Esperanto estus uzata de la aventur-herooj. Bedaŭrinde, li mortis antaŭ ol ĝin fini.

"Le Moulin des Apprentis" : La trimonata ligilo de Metilernantoj aperigas priesperantan kronikon. Ponumera prezo : 0,75 Fr.

Adreso : BONNAT (Creuse) - C.C.P. LIMOGES 481-72.

"L'Espoir" : "En MONTARGIS : Unuaj deviga kursoj de Esperanto en Francujo". Kun foto de S-ro DELAIRE aperis artikolo en ĉi tiu semajnorgano de la socialista partio. La koncerna kurso okazas en privata komerca lernejo. Tiu lernobjekto validas kiel la ceteraj. Instruas S-ro Pierre DELAIRE. Ankaŭ, li instruas Esperanton kiel nedevigan fakon ĉe la Orleana Universitato kaj en pluraj liceoj kaj kolegioj de Loiret. Sume : 400 lernantoj.

Esperantistaj aŭtistoj :

Aliĝu al la "Internacia Esperanto-Klubo Aŭtomobilista"

Abono de "Aŭtorevuo" : 5 Fr.; Glumarko (vignette) : 2 Fr. ĝirendaj al : S-ro Georges ODENT C.C.P. LILLE 1427-63.

Nepre precizigu la motivon de la pago.

## KARAVANO AL VIENO

Tiuj, kiuj ne iros al Tokio, tamen havos dum la somero 1965 la okazon viziti internacian kunvenon.

Por tiuj samideanoj estas organizata la EŬROPA ESPERANTO-KONFERENCO en VIENO kun la jena alloga programo :

11 Julio : Akcepto de la Konferencanoj en Vieno. Balo.
12 Julio : Malfermo de la Konferenco, ĉefreferaĵo; liberaj posttagmezo kaj vespero.
13 Julio : Ekskursoj per aŭtobusoj (kaj kablofervojo) al la montoj RAX (2.000 m.) aŭ al SEMMERING (1.000 m.), aŭ al NEUSIEDLERSEE-(lago), aŭ al la abatejo Göttweig kaj Melk.
14 Julio : Paroladoj kun prezentado de lumbildoj (aŭ filmoj) pri la temo "Esperanto en la ekonomio, en la politiko, en turismo".
Gvidadoj tra la urbo.
15 Julio : Ekskurso per ŝipo tra la Danuba Valo "Wachaŭ".
16 Julio : Finaj paroladoj. Ekskurso sur la vienan ponton Kahlenberg kun vizito de "Heuriger" en Grinzing (vin-gastejo por samjara vino).
17 Julio : Gvidado tra Schönbrunn (Imperiestra somerrestadejo).
Libera posttagmezo kaj adiaŭa vespero.

U.F.E. intencas organizi peraŭtobusan karavanon laŭ la jena vojprogramo :

10 Julio : Foriro el Parizo, Nancy, Strasbourg, Stuttgart (tranoktado).
11 Julio : Foriro el Stuttgart, Munkeno, Salzburg, Linz, Vieno.
Balo. Loĝado.
12 ĝis 16 Julio : Partopreno en la programo de la Esperanto-Konferenco.
17 Julio : Foriro (matene) el Vieno, al St-Margrethen (Svislando) kaj tranoktado.
18 Julio : Foriro el St-Margrethen, Basel, Troyes kaj Parizo.

La prezo por tiu karavano estos 298 fr. kaj entenos la ir- kaj re-vojaĝon per aŭtobuso, manĝojn survoje kaj tranoktadojn en Stuttgart kaj St-Margrethen.
Ni aranĝos propran viziton al la Imperiestra Restadejo Schönbrunn dum la programero "libera posttagmezo" (17 Julio).

Oni sin anoncu kun antaŭpago de 100 fr. al :
U.F.E., 34, Rue de Chabrol, PARIS (X°).

## INSTRUISTOJ!

Tuj post la Eŭropa Esperanto-Konferenco okazos en Graz konferenco de ILEI (Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj) inkluziva de Feria Stud-Semajno por instruistoj (Familianoj akceptataj) en moderna Studenta Domo (moderaj prezoj). Unulitaj kaj dulitaj dormĉambroj.
Por plia informo oni sin turnu kun reafranko al :
Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj,
Centre Régional de Documentation Pédagogique,
3 , Rue Roquelaine, TOULOUSE (31).

# LA IDEO PRI HELPLINGVO.

Oni povus miri pri tio, ke la ideo pri helplingvo, kiu hodiaŭtempe ŝajnas al ni tiel evidente k urĝe necesa, bezonis tiom da tempo por sin trudi al la homa spirito. Ĝi tamen ne estas nova.

"La samaj ideoj naskiĝas ĉe ĉiuj homoj", iam skribis FLORIAN (1). Kaj tio ĉi aparte koncernas la helplingvon.

Ĉiam, ĉe ĉiuj epokoj, la homoj ege sentis kiel netransirebla montriĝis la obstaklo starigita de la preskaŭ senlima diverseco de la lingvaĵoj parolataj de la diversaj popoloj. De la plej frua pratempo, la kreado de komuna lingvo estis unu el la precipaj ideoj, kiuj okupis la homan cerbon.

Lia penskapablo k lia trovemo multfoje provis solvi tiun malfacilan problemon.

La antikva homo konsideris la lingvodiversecon kiel punon truditan al la homaro de Dio. Biblio, kiel la persaj k asiriaj legendoj, kiuj priskribas la historion de Babelturo, sciigas, ke origine la Homaro parolis nur unu solan lingvon. Sed la homoj sentis sin potencaj. Ili ...is atingi la ĉielon konstruante altegan turon. Por puni ilin pro tia aŭdaco k ankaŭ por senpotenĉigi ilin, Dio decidis malsamigi ilian lingvaĵon. Tiam, la homoj ĉesis interkompreniĝi; kaj ili ne povis efektivigi sian orgojlan projekton.

En la antikvaj tempoj, ankaŭ kleraj homoj revis pri universala lingvo. Naskiĝis diversaj, ankoraŭ tre rudimentaj projektoj. Kvankam neperfektaj, tiuj ĉi prezentas gravan historian intereson. Tiuj unuaj provo[illegible] pri kreado de universala lingvo elmon[illegible] la homo, kiu vivis en tiu epoko, est[illegible] jam sen[illegible] la neceson de komuna lingvo.

En siaj famaj antaŭdiraĵoj (2), la fama mezepoka kuracisto k astrologo Mikaelo NOSTRADAMUS anoncis la kreiĝon de komuna lingvo uzotan de la latinaj k orientaj popoloj por siaj rilatoj.

Sed nedu[illegible]ble la gravaj permaraj malkovroj el XIV-a k XV-a jarcentoj pli k pli sentigis la bezonon de helplingvo. La konkero de la Nov-Mondo malfermis mirindajn k grandiozajn perspektivojn por novaj rilatoj. Por tiuj rilatoj ne plu eblis limiĝi je uzado de la lin[illegible]voj parola[illegible] sur la Malnova Mondo, nome : lingvoj babilona, greka, latina, eĉ per tiu [illegible]argono parolita en la mediteraneaj havenoj, la franka lingvo. Necesis nova pontolingvo por la popoloj ~~pkixxtexxsigix~~ de la malnova k nova mondo.

Ĉar la rilatoj inter popoloj pliintensiĝis laŭmezure kiam evoluis la civilizacio k multiĝis la komunikiloj, oni ĉiam pli akre sentis la bezonon de pli taŭga interkomprenilo. Tiam, la naciaj ĉeflingvoj celis ludi tiun rolon de internacia lingvo.

(sekvota)

Claude VERNAY. Elfrancigis : Lucien BOURGOIS.

(1) Description de la Perse, du Gouvernement, des Moeurs et des Religions de ses habitants.

(2) "Centuries", Lyon 1555.

La jara agadraporto aperos en la proksima bulteno.

---

Bulteno ofsete presita de : Centre National Espéranto-Office, 9 Bis, Rue du Cdt-de-Poli, ORLEAN
Le Gérant Resp. : Lucien BOURGOIS, 21, Rue Gambetta, NOYELLES-GODAULT (Pas-de-Calais).